

Ernest Naville
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 487, 1973.02.07 & 10

Cl.- Parolas Claude Gacond.

La pasintan jaron ni prezentis al vi prelegaron pri la unuaj jaroj de la esperanto-movado en Svislando. Ni tiam plurfoje prononcis la nomon de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, kiu estas la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo.

Kiu estis tiu ĝeneva filozofo Ernest Naville ? Kio estas la temoj de liaj verkoj ? Kio lin famigis en Genevo kaj en la kristana mondo ? Pri tio ni parolos dum kelkaj radio-elsendoj.

Ernest Naville naskiĝis la 13-an de decembro 1816 kaj mortis 93-jaraĝa la 27-an de majo 1909. Longa lucida vivo. Preskaŭ unu jarcento de verkista laboro. Ankoraŭ unu semajnon antaŭ sia morto Ernest Naville respondis al la ricevita letero kaj donis konsilojn al vizitantoj. Tiam ĵus aperis lia lasta filozofia verko : *Les philosophies affirmatives [la jesaj filozofioj]*, kie li refoje difinis sian pozicion de kristana filozofo.

La vivo de Ernest Naville disvolviĝis en aparte favoraj kondiĉoj. Filo de famiĝinta pedagogo, li estis edukata en Instituto de Vernier, modela lernejo, kiun gvidadis lia patro François Naville. Post teologiaj studoj Ernest Naville havis la okazon multe vojaĝi. Membro de riĉa burĝa familio, Ernest Naville povis tre rapide sin plene dediĉi al beletra kariero sen financaj zorgoj. Liaj kursoj pri kristana filozofio, liaj sciencaj studoj, liaj paroladoj lin rapide famigis en la franclingva Svislando kaj iom post iom en Francio kaj Eŭropo.

Lia hejmo en Ĝenevo kaj lia somera restadejo sur la najbara Monto Saleve fariĝis rendevuejoj de senĉese renovigita vizitantaro. Dank'al sia socia pozicio kaj al denaska simpleco Ernest Naville ludis la rolon de patriarko, ĉe kies tablo kunmanĝadas multnombra ĉeestantaro kaj ĉe kies hejmo deĵoradas helpema servistaro sub la konduko de obeema edzino. Ernest Naville apartenas al nun sonĝa mondo.

Ernest Naville ne estis tre originala pensisto. Antaŭ ĉio li estis ortodoksa kristano, kiu provis renkontigi katolikismon kaj protestantismon laŭ ekumena spirito. Kiel ni vidos, lia filozofio estas pli apologio de la kristanismo, ol memstara sistemo. Eĉ tio lia sukceso, sed ankaŭ lia efemereco. Kiu nun ankoraŭ legas la verkojn de tiu apologiisto, escepte de kelkaj studentoj pri teologio ? Krom la kristanismo, Ernest Naville ankaŭ defendis kelkajn avangardajn idealojn, inter ili ni menciuj la reformon de la balot-sistemoj. Se Svislando, dank'al la proporcia balotado, alvenis al kvazaŭ legenda trankvilo, tio estas grandparte unu el la rezultoj de la luktado de Ernest Naville. La proporcia balotado donas al la minoritatoj reprezentantojn en la decidpovaj kaj plenumaj instancoj. Alia grava idealo, kiu movis Erneston Naville, estas la intemacilingva ideo. 21 jarojn antaŭ la naskiĝo de Esperanto Ernest Naville ricevis en sia laborĉambro la Granddukon de Bade, kaj ni scias, ke ili diskutis pri la temo intemacia lingvo. Jen citado el lia *Biografio* verkita de lia nepino Helene Naville :

« 26-an de januaro 1866,- Alvenas la Grandduko de Bade, kiu restadas du horojn en mia laborĉambro.

27-an de januaro 1866,- Mi iras viziti la Granddukon en la hotelo Metropole (sekvo de nia interdiskuto pri la lingvo internacia.) [...] »

Tri jarojn poste, ĉiam dank'al lia *Biografio*, ni scias, ke okaze de restado en Parizo li renkontiĝas kun parizanoj por diskuti pri la intemacia lingvo. Ni citas :

« Mi havis la viziton de sinjoroj Jourdain kaj Gustave d'Eichtal, kun kiuj ni babilis tre vigle pri la lingvo internacia. [...] »

Bedaŭrinde la biografiistino ne interesiĝis pri tiu konversacio, kaj forigis el tiu letero adresita al la edzino de Ernest Naville ĉion, kio povus nin interesi. Ni esperas, ke tiu korespondado povos esti retrovita, ĉar ĝi povus alporti tre interesajn informojn pri la antaŭesperanta sinteno de la adeptoj de intemacia planlingvo.

Tuj kiam Ernest Naville konatiĝis kun la lingvo de Zamenhof, li fariĝis varma propagandisto de tiu lingvo-projekto. Ni havos la okazon vidi kiel.

Ernest Naville, malgraŭ sia maljuneco, restis en kontakto kun la junularo. Ni scias, ke li vizitis la 13- kaj 15-jarajn Edmond Privat kaj Hector Hodler por konatiĝi kun tiuj redaktoroj de *La Juna Esperantisto*. Edmond Privat skribis, ke la maljuna filozofo invitis la junajn redaktorojn lin viziti ĉiusemajne la lundon je la dekunua horo matene. Tiuj kunsidoj en la laborĉambro de Ernest Naville estis por Edmond Privat kaj Hector Hodler spirita riĉiĝo, kiu grandparte klarigas la postan sukceson de la du junaj pioniroj de Esperanto.

Pri ĉiuj tiuj temoj : vivo de Ernest Naville, penso de Ernest Naville, influo de tiu vivo kaj de tiu penso sur la junaj Edmond Privat kaj Hector Hodler ni parolos dum venontaj prelegoj.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Gis reaŭdo!